


LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA
ORGANO

POR LA
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10



Nederlando: jarabono f 0,75
Unuobla ekz. f 0.03
duobla ekz. f 0.06
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
(17 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

Por progresintoj.

PLEZURA TAGO KAJ BONGUSTEGA MANĜO.

(Ekrigardo en Frisa laborista familio.)

Je la dekunua la aliaj infanoj hejmen venis. Ankaŭ la patro venis el sia linrompejo por manĝi. Liaj haroj estis plenkovritaj de la malgrandaj fibretoj, kiuj deflugas de la lintrunketoj dum la rompado: tiaj fibretoj, kiuj ĉien enpenetras. La orelojn, la nazon, ĉion ili ŝtopas kaj plej malbone estas, ke ankaŭ en la gorgon ili venas kaj pro tio la linrompantoj plejofte ege tusas. Ankaŭ patro Marten jam ekhavis tiun tuson, kaj tre malforta li aspektis. La linrompado estis por li fakte tro peza laboro. Sed kion fari? Se li plendus pri ĝi, la mastro dungus alian laboriston kaj tiam li eĉ neniom povus perlabori; ĉar alia laboro estis preskaŭ ne trovebla dum la vintro. La laboristoj eĉ ĝoju, ke la mastroj almenaŭ ne forportas la linon al la foiro por vendi ĝin, sed prilaborigas ĝin de siaj propraj servistoj, kiuj pro tio ankaŭ dum la vintro havas iajn enspezojn.

Ankaŭ Eltje hejmen venis el la buterfabriko: „Patrino,” li kriis „malsaton mi havas! Ĉu la manĝo estas preta?”

Jes, ĝi estis preta! La patrino sekigis la terpomojn kaj ŝutis ilin en grandan ŝtonan pladon. Ĉiu ricevis antaŭ si pladeton kun mustardsaŭco, en kiu estis iom da grasaĵo. En tio ili trempetis la terpomojn, kiujn ili per la forko prenis el la plado.

La terpomoj estis malbonaj, vitrecaj — la bonaj kostis tro multe! Sed ili jam alkutimiĝis kaj manĝis bonapetite. La malgranda Vibe daŭre krietis: „Ĉi! Ĉi!” Ĉiufoje li suprenlevis sian forketon kaj la panjo ree devis surmeti malgrandan terpomon.

La eta kompatindulo! Li estis tiel malforta kaj malgranda kaj

de tiuj terpomoj li ne multe kreskis — estis ja tiom malmulte da nutro en ili! Tial la patrino donis al li de temp' al tempo pankruston por suĉi, tio estis ja io nutra. La infano bezonas fortodonajn rime-dojn, diris la kuracisto! Nu jes, iu pankrusto estis la sola fortodona, kiun la patrino por li havis

Ankaŭ por Afke mem (la patrino) ne sufiĉis tiuj aĉaj terpomoj, sed kion fari? La edzo zorgoplene rigardis ŝin, sed li ne povis helpi. La kvar aŭ kvin guldenoj, kiujn li gajnis en unu semajno, ĉiam estis elspezataj por la plej necesa. La patrino pensis pri sia eta, malforta bubeto, kaj la patro pri sia edzino, sed ambaŭ silentis pri tio, ĉar parolo ne helpas!

Kaj nun la tagmanĝo finiĝis.

La patro kaj Eltje reiris al siaj laboroj, la infanoj al la lernejo kaj Jaŭke denove restis hejme por fini la lastan mastrunlaboron. Afke profitis la okazon por iomete ripozi. Vespere atendas ŝin ankoraŭ sufiĉe da laboro! Tiam ŝi devas surmeti al la infanoj purajn subvestojn, kaj lavi la pantalonetojn de la knaboj, ĉar dimanĉon ili devas dece aspekti! Ankaŭ ĉiujn ŝtrumpetojn kaj ŝtrumpojn ŝi devas lavi tiun vesperon, kaj ŝi flikos ilin frue dimanĉmatene, ĉar ĉiu infano havas nur unu paron.

Sed, dum la patrino agrable ripozis, la pordo senbrue malfermiĝis kaj afabla vizaĝo enrigardis. Estis Vipkje, (filino, kiu servis en la ĉefurbo Leeuwarden), kiu de sia mastrino ricevis permeson pasigi unu nokton hejme. Jaŭke metis fingron al la buŝo kaj montris al la litŝranko, en kiu Afke dormis. Vipkje ektimis iomete kaj flustre demandis: „Ĉu la patrino ree malsanas?”

„Ne,” diris Jaŭke, „ŝi nun iom dormas, ĉar hodiaŭvespere ŝi havos ankoraŭ multan laboron pro la puraj vestoj por la dimanĉo!”

„Nu, ŝi do trankvile ripozu!” — Kaj la pli aĝa fratino unue rigardis la malgrandan infaneton, kiu ronkis en sia nesteto, — ĉar li iom malvarmumis, la etulo!

„Ho vidu, ion tian mi neniam vidis!” ŝi krietis. „Kian beletan liteton la patrino faris el la malnova drapa robo de mia sinjorino, kiun mi lastfoje alportis al ŝi! Tiu bona patrino, kiom multe ŝi faras! Vidu do, Jaŭke, kiom da laboro ŝi havis pro tio; ŝi bele najlis ĉion, kaj remburis per malnovaj ŝtofpecoj. Kaj eĉ kovrileton ŝi faris el la sama ŝtofo! Kiom bele kudrita kaj stebita! Nia patrino povas sorĉi, Jaŭke!”

„Jes,” diris Jaŭke, „nia patrino povas ĉion!”

Nun Vipkje ankoraŭ iom ordigis en la ĉambro, kiel nur virinoj

kaj knabinoj povas, kaj post tio ĉio aspektis agrable kaj hejmece.

„Fi, estas malvarme ĉi tie!” diris Vipkje. „Jaŭke, alportu kelkajn torfojn de la subtegmento, tiam mi instigos la fajron antaŭ ol la patrino ellitiĝas.”

„Ne plu estas torfoj, Vipkje!”

„Ne plu torfoj? Ho, la malfeliĉa patrino, kaj ŝi estas tiom senforta kaj malsanema! Kial ŝi ne skribis tion al mi. Iom da ŝparmono mi ja ĉiam havas!” Kaj ŝi sendis Jaŭke por alporti plenan sakon da torfoj, tiel ke la forno bone zumis, kiam Afke vekigis. Poste ŝi metis la restajn vitrecajn terpomojn sur la fornon kaj Jaŭke devis alporti por 10 cendoj da karotoj, kiujn ŝi alkuiris. Dum neniu ĉeestis, ŝi elpakis pecon da ŝinkohaŭto, kiun ŝia sinjorino forĵetis; tiun ŝi tranĉis en malgrandajn pecojn kaj kuiris ilin en la terpomoj kaj karotoj.

Kaj la infanoj, venintaj el la lernejo je la sesa, trovis la patrinon komforte sidanta en la seĝo, kusenon post la dorso, kaj la piedoj sur varma kesteto. Bonega manĝodoro estis en la ĉambro! Ho, kiom bone odoris! Kaj Vipkje diris, ke hodiaŭvespere estas tiom da terpomoj kaj karotoj, ke ne nur la patro kaj Eltje, sed ankaŭ ĉiuj aliaj povos kunmanĝi.

Kaj tiam Vipkje komencis elpaki. Por ĉiu ŝi kunportis malgrandajn: por la patro duonan funton da tabako, por la patrino dudek ovojn kaj skatoleton da ĉokolado de sia mastrino, por Eltje du cigarojn, por Jaŭke novan naztukon, por Klas kaj Jetske po paro da ŝtrumpetoj, por la knabinoj po paro da belaj ŝtrumpligiloj, por Vibe ĉokoladcigaron, kaj por la suĉinfano la plej multon, ĉar tiu ricevis varman subjupeton, robeton kaj paron da plej belaj ruĝaj ŝtrumpetoj.

Kiom da ĝojo en la familio! Ĉiuj estis same dankaj. Kvankam la aliaj knaboj iom ĵaluzis pro la cigaroj de Eltje, ili tamen ĝojis pro siaj vestaĵoj, ĉar malofte okazas, ke laborista infano ricevas ion tutnovan.

La patro kaj Eltje trovis gajan grupon ĉirkaŭ la tablo kaj ĝue ili manĝis la terpomojn kun karotoj.

„Neniam ili tiel bongustis al mi!” diris patro Marten kaj klakante per la lango: „Ili havas ian delikatan kromguston — kio estas?”

Ĉiuj infanoj gustumis tre atente kaj vere ili havis guston, ĝis nun ne konatan, sed estis bongustege!

Nun Vipkje ekridis. „Jes,” ŝi diris, „tio estas nun surprizo, pri kiu mi eĉ al la patrino ne parolis. Ĉu mi diru, Patro, de kie devenas

tiu bona gusto? Ĝi estas de peco da ŝinkohaŭto, kiun mia sinjorino forĵetis, kaj kiun mi konservis por vi!"

„O, o," diris Klas, „kiom riĉa estas via sinjorino, ke ŝi forĵetas tian bongustan manĝaĵon!"

„Ho ne," diris Vipkje, „tiom eksterordinare riĉa ŝi ne estas, sed tiuj homoj ja ne alie kutimiĝis. Ili havas delikatajn buŝetojn kaj la haŭto de la ŝinko estas al ili tro kruda. Se ili sciuis, kiom ĝi bongustas!"

„Jes, se ŝi sciuis!" diris Eltje, „sed gardu vin, Vip, ne rakontu al ŝi; eble foje ŝi denove forĵetas tian pecon, kaj vi ree povos kunporti por ni!"

Pri tio ĉiuj ridis. Estis plezura tago!

(El: „La Deko de Afke" de N. van Hichtum)

VANE.

LA VOJO DE LA MARO.

Fine iun tagon ekveturis Urso Ferflank por renkonti siajn patron kaj fratojn, kiuj troviĝis sur la maro inter Anglujo kaj Francujo, kien la danaj vikingoj*) ofte ŝipveturis.

Post kiam la ŝipoj estis preter Skagen, la plej norda parto de Jutlando, ekŝtormis; ĉiuj ŝipoj puŝiĝos al la jutlanda marbordo kaj pereu ilin minacis.

La ŝipo de Urso Ferflank, kiu estis la plej granda, venis en granda danĝero. Ĉiuj viroj kuŝis sur la remiloj kaj ege tiris ne nur dum kelkaj momentoj, sed horon post horo, ĝis la sango fluis de iliaj manplatoj. La longa, peza ŝipo kelkfoje levis la nazon tiel alte, ke la ŝipo staris preskaŭ vertikale.

Apud Urso Ferflank, kiu ĵus anstataŭis la direktiston, staris Hastejn, atenta kaj pripensanta.

Iom post iom evidentiĝis, ke la ŝipo spite al la ega batalo puŝiĝos al la marbordo. Estis la alfluo, kiu puŝis ĝin, sed la ŝipistaro, kiu laboris kaj laboris kaj tamen vidis la teron pli kaj pli proksime, ne alie povis klarigi la aferon ol ke iu forta mano — Pan? — la kilon prenis de malsupre kaj kondukis ilin al morto kaj pereu.

La ŝipistoj ekperdis la fortojn kaj rigardis unu la alian. Oni kriis, ke Pan postulas viktimon, kaj ke oni lotu, kiu oferos sin per salto en la maron.

*) Dum la jaroj 800—1000 la loĝantoj el la nordaj landoj de Eŭropo precipe el Norvegio iris per ŝipo suden por rabi kaj murdi. En multaj regionoj, kiujn ili vizitis, neniu restis vivanta. Iliaj ŝipestroj estis nomataj **Vikingoj**. Nur tiu povis fariĝi Vikingo, kiu ĉiam dormis sub la libera ĉielo.

La marbordo estis jam tiel proksime, ke ili povis vidi homojn, kiuj movis sin sur la sablo, kien falegis la ondoj kun blanka ŝaŭmo, homojn kun ĉapoj surkape kaj longaj stangoj enmane, kaj la viroj sur la ŝipo bone sciis, kio povus okazi. La stangoj havis feran hokon, per kiu oni povis tiri la ŝiprompiĝulon al si kaj mortigi lin. Estus ne bone alveni tie.

Kaj daŭre la ŝipo proksimiĝis al la bordo. Sed nun reĝo Hastejn staras sur la ferdeko. Ili vidas, ke li tenas la direktilon. Ĉiuj silentas. Kion li faras unua, ŝajnas freneza. Li turnas la ŝipon tiel, ke la ŝipflanko kontraŭas la ondegojn kaj la verda akvo falegas sur la ŝipon kaj la maristojn; sed ĝuste tion li volas. Poste li ree turnas la ŝipon. Ĉiuj estas malsekaj; ili spiregas kaj sur la lango ili havas la salan guston de la morto.

Kaj nun li komencas ordoni. Li sin skuas kaj montras la dentojn; terura vorttorento fluas el lia buŝo. Ne plu li ludas „iri piedfingre”, sed li staras firme kiel roko sur la ferdeko, kun okuloj larĝe malfermitaj. Lia voĉo ne plu estas kareso; kiel vipo ĝi tranĉas la ventegon de la antaŭa ĝis la malantaŭa parto de la ŝipo. Kaj ili remegas. Neniam antaŭe oni tiel remis. Hastejn kriegas la takton kaj la viroj laboregas kaj laboregas, fiksante la piedfingrojn. Kaj sur la ferdeko staras Hastejn kaj mem remas. Li ĵetas sin antaŭen kaj reen en la aero, samtakte kun la viroj, sed pli forte; estas kvazaŭ lia volo sin trudas al la viroj. Kaj la drivo ĉesas.

Sed kiam ili atingis tion, ke la marbordo ne plu alproksimiĝas, ke ili restas samloke, tiam Hastejn ekpensas pri Pan, kiu certe postulas donacon. Jes, jen ĝi estas, kaj grandan lancon li ĵetas en la ondojn.

Ili remas kiel furiozuloj kaj nun ili progresas. Kaj kiam ili tion sentas, la fortoj pliiĝas. Antaŭe ili ĝemis malespere pro la granda mizero, sed nun ili kantas kaj batas la maron per la remiloj, ĝis fine la tirado de la fluo kaj la kontraŭvento ĉesas.

Kaj kiam finfine ili estas en sekureco sur la vasta maro kaj remas antaŭen, tiam estas kvazaŭ la ŝipo kantas; ili kantas kaj ridas ĉe la remiloj, kaj en la sovaĝaj vortoj, kiuj ŝvelas kiel teksto por ilia maro- kaj ventokanto, ĉiam ripetiĝas la nomo de Hastejn: Hastejn, Hastejn. La haroj leviĝas pro la sovaĝa ĝojo, kiam ili kantas, kantas kaj remas: Hastejn, Hastejn.

La aliaj ŝipoj, kiuj estis en la sama mizero, atingis samtempe kun la gvidanta ŝipo la vastan maron. La ekzemplo de la ŝipo de Hastejn donis al ili novajn fortojn. La ŝiparo estis savita. Mal-

antaŭ la ŝipoj malaperis la ebena, grizkolora marbordo de Jutlando kaj antaŭ ili, okcidente, la ĉielo kaj la maro renkontiĝis en la horizonto.

Jam antaŭ la vespero ili vidis ĉiudirekte nur la maron kaj la ĉielon. Al tiuj, kiuj antaŭe neniam estis tiel malproksime de la bordo, tiu vido estis impresoj, kiu ilin silentigis.

La suno malaperis en la serenon maron; malheliĝis kaj ili ne hejmen iris. Ne plu kvieta nokto sur la firma tero. Ĉi tie sur la balanciĝanta ŝipo ili nun vivos dum longe.

La vespera ruĝo malaperis de la ĉielo. La nokto alproksimiĝis, sed nun vidiĝis la steloj. Dekstre „la granda urso”; ĉiuj ĝin konis de la infanaĝo; ĝi sekvas ilin trans la maro.

Unu post la alia la maljunaj, spertaj viroj, kiuj antaŭe jam ŝipveturis sur la okcidenta maro, sin klinis senvorte, prenis vestaĵon sur la kapon kaj poste ne aŭdigis sin; dume la longa nokto malleviĝis super la ŝipo.

T. Kalundborg, Danujo.

Trad. Nederland.

KARA SAMIDEANO.

Okaze de la Tago de Bonvolo je la 18a de Majo aperas ĉiujare la gazeto „La Junularo kaj la Mondpaco” en 13 lingvoj, i.a. en Esperanto.

Ankaŭ ĉi-jare ni aperigos la Esperantan eldonon, kaj per tio ni havas la plej bonan ŝancon montri la „internan ideon” de Esperanto. Ĉar nur la arda deziro, ke iam venu paco inter la homoj, instigis Zamenhof krei nian amatan lingvon. Montru ni, ke ni estas fidelaj trezorgardantoj kaj streĉu ni ĉiujn fortojn servi la pac-ideon pere de Esperanto.

La gazeto enhavos krom la „Mesaĝo de la infanoj de Kimrujo”, diversajn pac-artikolojn.

Kiel aldono aperos plue „La Juna Vivo” kun kontraŭmilita rakonto de Bertha van Süttner.

Ni estas certaj, ke vi ambaŭ-mane kaptos la okazon kaj vendos kiom eble plej multe da ekzempleroj.

La prezo estos: po I, 50 guldenoj por 50 ekz. plus dek procentoj sendkostoj. Unuopaj ekz. kostos 5 nederlandajn cendojn.

Mendojn volonte akceptos la redaktorino de la „Junularo kaj la Mondpaco”.

S.ino ROMEYN—TUCKERMANN,
Nassau Zuilensteynstr. 2, Hago, Nederlando.

Gironumero 100325.

(1 guld. 2,1 Sv. fr. 0,70 dol.)

DU AVARULOJ.

Avarulo el Kufa aŭdis, ke en Basora vivus ankoraŭ pli granda avarulo, de kiu li povus lerni. Li vojaĝis tien kaj sin prezentis kiel komercanton en la arto de avareco, kiu volas lerni de tia fama majstro.

„Bonvenon!” diris tiu avarulo el Basora, „ni tuj iru al la vendoplaco por aĉeti.”

Ili iris al bakisto: „Ĉu vi havas bonan panon?”

„Je via servo, sinjoroj, freŝan kaj molan kiel butero.”

„Vi aŭdas,” diris la Basora-ano al la Kufa-ano, „ke butero estas pli bona ol pano, do ni estos pli prudentaj, kiam ni preferos buteron.”

Ili iris al butikisto kaj demandis, ĉu li havas bonan buteron.

„Je via servo, freŝan buteron, bongusta kiel la plej delikata olivoleo.”

„Vi aŭdas,” diris la gastiganto al sia gasto, „ke oni komparas la plej bonan buteron kun oleo, kiu sekve devas esti multe pli bonkvalita.”

Nun ili iris al oleovendisto: „Ĉu vi havas bonan oleon?”

„Da plej bona, klara kaj diafana kiel akvo.”

„Ho, ho,” diris la avarulo el Basora al tiu el Kufa, „akvo do estas la plej bona manĝo. Hejme mi havas tinon tutplena, per kiu mi lukse vin volas regali!” Kaj vere li prezentis al sia gasto nenion alian ol akvon, ĉar ĝi estas pli bona ol oleo, oleo pli bona ol butero, butero pli bona ol pano.

„Dankon al Ala,” diris la avarulo el Kufa, „mi ne vane faris mian vojaĝon, sed mi lernis ion utilan.”

Arvika. Svedio.

Laŭ araba anekdoto: EGULO.

KORESPONDADO:

Pro manko de spaco kaj aliaj cirkonstancoj mi ne povas respondi al la multaj leteroj. — Koran dankon pro ili.

La Maja numero aperos je la „Tago de Bonvolo” (18 Majo) kune kun „La Junularo kaj La Mondpaco”. Vidu la cirkuleron en ĉi tiu numero. En ambaŭ gazetoj ni enpresigos nur pacartikolojn.

POR KOMENCANTOJ.

LA MENSOGO.

Iam patro promenis kun sia filo, la malgranda Johano, al apuda urbo. Dumvoje ili preteriris farmdomon, antaŭ kiu sidis granda gardo-hundo.

„Jen,” diris la patro, „vidu do, kia granda hundo!”

„Mm,” respondis Johano, kiu estis sufiĉe fanfaronema, „mi trovas ĝin tute ne granda. Hieraŭ estis en nia vilaĝo sinjoro kun hundo, kiu estis tiel granda kiel kiel certe kiel bovo!”

La patro silentis. Li bone komprenis, ke la knabo fanfaronas. Iom poste li tamen diris: „Jes, estas strangaj aferoj en la mondo. Ekzemple, tuj antaŭ la urbo, al kiu ni iras, estas ponto; kaj ĉiu, kiu transiras ĝin, kaj antaŭ nelonge mensogis, tiu falas kaj rompas al si kruron.”

Ĉi tiuj vortoj iom timigis Johanon.

„Ĉu ni ankaŭ devas preterpasi tiun ponton?” li demandis.

„Jes,” respondis la patro, „alie oni ne povas atingi la urbon.”

La mieno de la knabo pli kaj pli malĝojiĝis; li havis malpuran konsciencan. Post kelka tempo li diris: „Patro, mi diris, ke la hundo, kiun mi hieraŭ vidis, estis tiel granda kiel bovo, sed estis nur malgranda bovo!”

„Ĉu?” nur respondis la patro.

Iom poste Johano ree komencis: „Patro, nun mi bone memoras. la hundo estis tiel granda, kiel bovido.”

La patro ne respondis, li nur ridetis. Silente ili promenis pluen, ĝis fine ili atingis la ponton. Subite Johano pinĉis la manon de sia patro. „Patro”, li diris per tima voĉo, „haltu do momenton! Mi volas diri al vi ion! La hundo, kiun mi vidis, estis nur ordinara hundo! Mi mensogis! Ĝi tute ne estis pli granda ol tiu, kiun ni vidis antaŭ la farmdomo!”

„Nu knabeto,” diris la patro kviete, „ankaŭ mi iom mensogetis, ĉar ankaŭ ĉi tiu ponto estas nur ordinara ponto.”

West-Grafdijk.

N. KOOL.

ATENTU!

Abonu nun la duan jarkolekton de „La Juna Vivo”. Vi ricevos „La Majan Numeron” senpage.

LA SUBSKRIBOJ DE LA BILDOJ.

1. Ĝi ne povas atingi la sonorilon. 2. Mi helpos vin!
 3. Ĉu la doktoro estas hejme? 4. La patrino baldaŭ resaniĝos.




ZE KAN ER NIET BIJ.



IK ZAL JULIE EENS HELPEN



IS DOKTER THUIS?

MOEDER WORDT WEER
GAUW BETER.

Bonvolu rakonti la enhavon de ĉi tiuj kvar bildoj.



La plej bonajn verkaĵojn ni metos en la gazeton.

Al la sendintoj de la du plej bonaj verkaĵoj ni donos du premiojn.

Metu sub vian leteron: nomon, adreson kaj aĝon.

El: „T. van den Brink en Th. Lancée, Onze eigen taal”, J. B. Wolters, Groningen-Den Haag-Batavia.

NOVAJ ENIGMOJ.



a, a, e, e, d, d, d, i, i,
k, k, l, l, n, n, o, o, o, r, u,
u. La vortoj signifas hori-
zontale kaj vertikale:

1. Gravan eltrovaĵon.
2. Numeralon.
3. Parencon.

a, a, a, e, i, u, n, o, o, o, u, z, z.

La vortoj signifas:

En la mezaj diagonalaj vicoj: beston,
Horizontale: literon, utiligi, beston,
membron, literon.

Riga. Latvujo.

B. REICHBERG.

Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni disdonos 4 premiojn.
Ni akceptas solvojn ĝis 1 Julio.

MALAVARECO.

Sinjoro Mejer vidas sur la strato knabon, kiu akre ploras.

„Kial vi ploras?” li demandas lin. „Kio okazis?”

„Mi perdis moneron kaj ne plu povas trovi ĝin.”

„Nu, ne ploru plu, knabo. Se vi ne retrovas ĝin antaŭ ol noktiĝas,
— jen alumeto.”

Nanterre. Francujo.

R. MATHIJN.

LUDO.

La gvidanto rakontas: „Mi trovis survoje viron, kiu perdis la
memoron. Por eltrovi, kio estas liaj profesio, aĝo, k.t.p., mi kun-
prenis la enhavon de liaj poŝoj. Ni kune divenu, kiu li estas!”

Samtempe li metas ĉiajn objektojn (plumon, krajonon, najlojn,
martelon, il. poŝtkartojn, notlibron, biletojn k.t.p.) sur la tablon.
Ĉiu diru ion pri la identeco, profesio, de la trovita viro.

West-Graafdiijk.

N. KOOL.

ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 7 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace
„La Unuan Jarkolekton” (binditan) de „La Juna Vivo”. Do mult-
valoran libron de proksimume 200 paĝoj.

LA DEKOKA LECIONO.

KIU SCIAS?

- A. Ĝi flugas en la aero, ĝi kuŝas sur la tero.
 Ĝi estas blanka kiel **lano**, ĝi **degelas** en la mano.
 Per ĝi blankiĝas la **pejzaĝo**, ni ŝatas ĝin dum juna **aĝo**.

LA HUNDO KAJ LA DU LEPOROJ.

B. Hundo **intencis** kapti junan leporon. La leporo tre rapide **fugiĝis**, sed la granda hundo **sekvis** ĝin ankoraŭ pli rapide. La hundo preskaŭ jam atingis la malfeliĉan leporidon. Sed subite saltis el la **terbuloj** granda, maljuna leporo.

La hundo vidis ĉi tiun kaj pensis: „Mi **ĉasos** la grandulon. **Des** pli granda estos la kaptaĵo.”

Kaj ĝi sekvis la grandan leporon. Sed ĉi tiu kuregis pli rapide ol la hundo kaj forkuris al la arbaro.

Dume ankaŭ la leporido **savis** la vivon kaj la avida hundo kaptis nenion.

Aŭstrio

WIESBÖCK.

LA CIKONIO KAJ LA VULPO.

C. Vulpo **renkontis** cikonion. La cikonio havis malsaton. La vulpo diris: „Venu al mi por manĝi.” La cikonio iris al la vulpo. Sur la tero staris teleroj kun supo el ranoj. La vulpo komencis manĝi, sed la cikonio havis longan **bekon**, per kiu ĝi ne povis manĝi el **plata** telero. Post la manĝo la cikonio **invitis** la vulpon. La vulpo akceptis la inviton kaj ĝi iris al la cikonio por manĝi. Sur la planko staris ne teleroj, sed altaj vazoj. La cikonio per la longa beko povis manĝi, sed la vulpo ne povis manĝi, ĉar ĝi havas larĝan kaj grandan buŝon, kaj ĝi ricevis nenion.

Nun la cikonio ridis kaj la vulpo iris for kun malplena **stomako**.

D. mono — monero, pano — panero, neĝo — neĝero, fajrero, **polvero**, **lignero**, akvero, **sablero**.

porko — porkido, bovo — bovido, reĝo — **reĝido**, hundido, leonido, ŝafido, kokido, elefantido.

- I. Lernu parkere la novajn vortojn en A, B, C, D.
- II. Traduku A, B, C, D en vian gepatran lingvon.
- III. Post kelkaj tagoj traduku A, B, C, D el via gepatra lingvo en Esperanton.
- IV. Lernu parkere la enigmon „Kiu scias”.
- V. Respondu al la demandoj:

Kion intencis la hundo? Ĉu ĝi sukcesis? Kio saltis el la terbuloj? Kial la hundo ŝanĝis la unuan **planon**? Kiun leporon ĝi nun sekvis? Ĉu ĝi povis atingi la grandulon? Ĉu la hundo kaptis la leporidon?

Kial la vulpo invitis la cikonion? Ĉu la cikonio akceptis la inviton? Kio staris sur la tero? Ĉu la cikonio manĝis multe? Kial ne? Kio okazis poste? Ĉu la vulpo iris al la cikonio? Kie staris la altaj vazoj? Ĉu la vulpo bonguste manĝis? Kial ne? Kiu nun ridis?

LA DEKNAŬA LECIONO.

BIRDOJ EN LA VINTRO.

Neĝo kovris la tutan ĝardenon. Sur la vojetoj, la **bedoj**, la **arbetoj**, ĉie kuŝis la neĝo.

„Kie mi nun nutros la kolombojn, patrino?”

„Portu iom da **semo** al la fenestrobreto.”

Tuj kiam Petro estis en la domo, la kolomboj venis por manĝi.

Ili ne timis la du infanojn en la ĉambro. Kaj tiuj tamen staris tuj malantaŭ la vitro.

„Kiom komike! Rigardu la **paserojn!**” diris Manjo. „Ili saltetas! Ili ne paŝas. Kiel ili **streĉas** la kolojn!”

„Venu ĉi tien, Manjo!”

La infanoj iris iom malantaŭen. Tuj venis la paseroj al la fenestrobreto. Ili prenis **semeron** kaj rapide forflugis.

„Jen, denove venis la granda birdo. Kiel oni nomas ĝin?”

„Kie?”

„Tie ĝi sidas malantaŭe en la ĝardeno.”

„Ĝi estas la griza **korniko.**”

„Jen, ankoraŭ unu, eĉ du. Tiuj estas pli malgrandaj. Ili estas idoj, ĉu ne?”

„Ne, vi **eraras**, ili ne estas grizaj kornikoj. Ili estas nur iom grizaj sur la **nuko**. Estas turo-kornikoj,” diris la patrino.

„Estas nun por la birdetoj malfacila tempo.”
 „Kial, patrino?” demandis Petro.
 „Ili devas iri sur la neĝo per nudaj piedetoj.”



„He, kiel malvarme!” diris Manjo.
 La patrino ridis. „Tio ne estas la plej malbona por ili,” ŝi diris.
 „Sed kie ili nun serĉas nutraĵon? Ĉio ja estas sub la neĝo!”
 Petro kaj Manjo ree rigardis al la birdoj.
 Ĉu mi donos al ili pecon de mia **buter-pano**, patrino? diris Petro.
 „Mi ankaŭ, patrino?” demandis Manjo.

El: „Ligthart en Scheepstra, Dicht bij Huis”, J. B. Wolters, Groningen—
 Den Haag—Batavia.

KURACISTO KAJ PACIENTO.

Malsanulo plendas al kuracisto pri nenormalaĵo apud la koro.

La sanigisto, supraĵe pririgardinte la malsanulon, diras:

„Jen, tie ĉi vi havas ioman ŝvelaĵon; necesas ĝin malgrandigi.”

„Ho, doktoro”, ridetas la paciento, „tie ja troviĝas mia monujo! Mi petas vin ne tro maldikigi ĝin.” (El soveta lerneja murgazeto).

Simferopolo, Sovetio

M. P.

ĈU VI POVAS KALKULI?

Heliko intencis rampi al la pinto de kolono, kiu estis naŭ metrojn alta. Tage la heliko suprenrampis tri metrojn. Sed nokte ĝi devis ripozi kaj dume reglitis du metrojn. Nun vi devas kalkuli, kiam la heliko atingis la supron de la kolono.

Aŭstrio

J. WIESBÖCK.

KORESPOND-ADRESOJ:

ĉiu vorto: 0.03 gld.

„**Esperanto**, kursa lernolibreto por memlernantoj”. Prezo 4 respondkuponoj. afrankite.

„**Malgranda Adamo**”. Rakonto por la junularo, legolibreto por komentantoj. Prezo 2 respondkuponoj, afrankite.

Adreso: Stjepan Mišak, Esperanto, Adama, Turkujo.

„**Franca Esperantisto**”, oficiala organo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto, Ĉefkunlaborantoj: S.roj Archdeacon, Bastien, Cou-teaux, Schwartz, Corret, Petit.

Abonprezo por unu jaro: 25 francaj frankoj; provekzemplerlo kontraŭ I respondkupono, al F.ino Bonnet, 12, place d'Anvers, Paris IX.

Poŝtĉekkonto: Paris 669—74.

Kiu favoras la interplektiĝon de du gravaj internaciaj movadoj (la skolta kaj la esperanta), tiu helpu per abono al „**Skolta Bulteno**”, la kvaronjara gazeto. Senpagan specimenon de: 54, Constable Road, Ipswich, Anglujo.

Abonu „**Verda Revuo**”. Sendependa gazeto pri arto, scienco kaj amuzo.

Aperas monate. Jarabono 3,50 svfr.

Mendebla ĉe la administrejo: **Wien VII, Hermansegasse 31/26, Aŭstrujo.**

Nederlando: Sendu f 0,30 aŭ du respondkuponojn al la redakcio de „La Juna Vivo” kaj vi ricevos 10 diversajn esperantajn gazetojn.

MALALTIĜO DE LA REKLAMTARIFO:

I paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.;

Organo de jugoslava esp. movado
 „LA SUDA STELO”
 aperas ĉiumonate en Sl. Brod.
 Jarabono: 1½ us. dol. aŭ 5 svfr.
 Specimenon kontraŭ poŝta respond-
 kupono tuj sendas Redakcio de „La
 suda stelo” Slav. Brod, (Jugoslavio).



„FLORETOJ”
 Porinfanaj Rakontoj
 tradukitaj de la
„VENDREDA KLUBO”
 en Winschoten
 (Nederlando)

Jarkotizo

Aŭstrujo	3.20 ŝil.
Britujo	3 ŝil.
Belgujo	15 fr.
Ĉeĥoslovakujo	16½ Ĉ. kr.
Danujo	3 kr.
Francujo	10 fr.
Svislando	2. 10 fr.
U.S.A.	0.70 dol.
Germanujo	1.75 M.
Hispanujo	5 pes.
Norvegujo	2.7 kr.
Polujo	3.6 zl.
Svedujo	2.70 kr.

Kun multaj koloraj kaj nigraj
 bildoj
 de C. Jetses
 prezo 0.70 ned. guld.

**Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
 eldonisto:**

J. B. WOLTERS

**Groningen — Den Haag
 Batavia.**

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

- Ameriko:* Amerika Esperanto-Instituto, Madison. Wis., Usono.
Anglujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.
Belgujo: Hendrik Ranson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.
Ĉeĥoslovakujo: L. J. Svoboda, Plzen, „U Zvonu” ĝironumero 14171 Praha.
Danujo: S.rino M. Jensen, Galtrup. Erslev. ĝironumero 44593.
Francujo: S.ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d’Or.
 ĝironomero: Cheque postal No. 12025. Dijon. (Côte d’Or).
Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana
 ĝironumero: „Köln 104097”.
Hispanujo: S.ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2°, 3°, Barcelona.
Svedujo: John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.
Japanujo: Ishiguro, Daita 1—784, Setagaya, Tokio.
Ĉinujo: S-ro Ĉan, 15 Shang Sieh Chia, Peiping.
Bulgarujo: Ivan Krestanov, str. 6 Septemvri, Sofia.

Oni povas pagi per eksterlanda poŝtmandato, 7 poŝtrespondkuponoj, *) ĝiro-
 konto, aŭ papermono en letero. Informiĝu en la poŝtoŝtanco, kio estas la plej
 malkara.

*) Abonantoj, kiuj ne rajtas sendi monon eksterlanden, povas pagi per
 7 respondkuponoj.